

ISSN 0023-3692

# KONTAKTO

numero 219 (2007:3)

## Misteroj de la mondo...

- ★ *Mistika vojaĝo de Nikolao Roerich*
- ★ *Supernaturaj fenomenoj: ĉu ekzistas?*
- ★ *La novaj aventuroj de Marino Curnis*
- ★ *Socioniko: inter scienco kaj arto*



Jam pasis 5,5 jaroj, ekde kiam mi skribis mian unuan redaktoran saluton en tiu ĉi kolumno, kaj jen venis tempo skribi ankaŭ mian lastan redaktoran kolumnon: mia laboro ne plu permesas al mi dediĉi tiom grandan parton de mia tempo, kiom indas, al la redaktado... Estis vere

nekredible dum pli ol kvin jaroj esti redaktoro de *KONTAKTO*! Tio estis granda honoro, granda plezuro kaj granda respondeco – kaj ĝi vere estis (kaj ankoraŭ estas!) grava parto de mia vivo: ja kvankam mi foriras de la ĉef-redaktora posteno, mi daŭre kunlaboros kun *KONTAKTO*: mi faros grafikan laboron kaj, se la tempo permesos, – verkos.

Ne estos troigo diri, ke redaktado de *KONTAKTO* ŝanĝis mian vivon: ja dank' al ĝi mi konatiĝis kun mia kara edzo, Joel! Mi estas tre bonŝanca pro tiu ĉi unika okazo amikiĝi kun tiom da bonegaj homoj el la tuta mondo, lerni ion novan pri aliaj landoj, lingvoj, kulturoj kaj politiko de ĉiu preparita numero. Estis vere granda privilegio servi al Esperantujo, al TEJO kaj UEA, kaj mi volus danki la oficistojn kaj volontulojn de la CO de UEA kaj TEJO, la presiston kaj ĉiujn, kiuj helpis, subtenis kaj konsilis. Mi aparte dankas ĉiujn aŭtorojn, kiuj volontule dediĉis siajn talentojn, sciojn kaj tempon por kontribui al *KONTAKTO*, kaj la legantojn, pro via membriĝo (kaj re-membriĝo), abono (re-abono) kaj subteno!

Krome, apartan dankon meritas mia edzo Joel (prolegisto ekde 2002 kaj vic-redaktoro ekde 2003) kaj la estonta redaktoro Paŭlo (prolegisto ekde 2003 kaj vic-redaktoro ekde 2006). Mi ne povas imagi *KONTAKTO*-n sen ilia helpo, kaj mi kore deziras al Paŭlo agrablan kaj fruktodonan laboron en la posteno de redaktoro!

Bone, nun ni parolu pri tiu ĉi numero, kiu, cetero, estas tre diverstema. Sur p. 3 atendas vin intervjuo kun la nova *KONTAKTO*-redaktoro Paŭlo Moĵajev. Rilate al la temo "Misteroj de la mondo", vi ekscios pri du elstaraj mistikuloj de nia tempo Nikolao Roerich (p. 4-5), kiu, cetero, ege favoris al la ideo de internacia lingvo, kaj Helena Blavatsky (p. 7). Krome, sur p. 8 kaj 9 atendas vin artikoloj pri parapsikologio kaj pri unu el la plej misteraj lagoj en la mondo – la lago Kanas, Ĉinio.

Multaj esperantistoj jam konas la mondvojaĝanton Marino-n Curnis (kaj lian unikan kvinjaran perpiedan vojaĝon tra Eŭropo kaj Azio) el la antaŭaj artikoloj pri li en *KONTAKTO* kaj aliaj E-revuo. En tiu ĉi numero vi ekscios pli pri *Pedibus Calcantibus* en la nova intervjuo de Marino (p. 6-7)!

Ĉu vi aŭdis ion pro socioniko? Ĝi estas tre interesa scienco (aŭ arto?), kiel kompreni aliulojn. Legu artikolon de la nova redaktoro pri socioniko sur p. 10-11. Kiel ĉiam, en ĉi tiu numero atendas vin novaj aventuroj de la musa anti-heroo Rat-Man, recenzo, "Anguleto" kaj ankaŭ raporto el Kabulo.

Agrablan legadon – kaj ni esperas je via kunlaboro kaj kontribuoj al la sekvaj numeroj de *KONTAKTO*!

*Ĝenja*

## <ENHAVO>

|   |       |
|---|-------|
| La sekva <i>KONTAKTO</i> -redaktoro prezentas sin.....  | 3     |
| Vivas en Hindujo Beleco...": Aziaj misteroj de Nikolao Roerich (Julija Patlanj, Ukrainio) ..... | 4-5   |
| Mondvojaĝanto Marino Curnis: "Klopodu esti feliĉa!" .....                                       | 6-7   |
| Helena Blavatsky (Ursula Grattapaglia, Germanio/Brazilo).....                                   | 7     |
| Supernaturaj fenomenoj: ĉu ili ekzistas? (Wendel Teles Pontes, Brazilo) .....                   | 8-9   |
| Monstroj de la lago Kanas (Alice Liu, Ĉinio) .....  | 9     |
| Socioniko – la arto kompreni la aliulon (Paŭlo Moĵajev, Ukrainio).....                          | 10-11 |
| Kiom diversaj ni estas? (L. A. Koĉubejeva kaj M. L. Stojalova).....                             | 12    |
| Komikse: Projekto RoMEo – finfine la komenco!.....  | 13    |
| Recenze: Pri praktika mistikismo – en Esperanto! ..   | 14    |
| La ŝanĝiĝoj kaj ni (Onyelukachukwu Etuazim, Niĝerio/Usono) .....                                | 14    |
| "Anguleto": Scivolemejo (Aneta Ubik, Germanio/Argentino).....                                   | 15    |
| Informe, gratule .....  | 15    |
| Kabulo (Samad Qarluq, Afganio).....   | 16    |

**Sur la kovrilo: la Himalajaj Montoj (el Vikipedio).**

### Kiel sendi kontribuojn al *KONTAKTO*?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do *ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

*KONTAKTO*: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 219** (2007:3), 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo**: <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA**: ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)>. **Redakcio**: *KONTAKTO*, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <[kontakto@tejo.org](mailto:kontakto@tejo.org)>. **Redaktoro, grafikisto**: Eugenia AMIS (Ukrainio/Usono). **Vic-redaktoroj**: Joel AMIS (Usono) kaj Paŭlo MOĴAJEV (Ukrainio). **Ĉef-korektisto**: Paŭlo Moĵajev (Ukrainio). **Presado**: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <[skonpres@poczta.onet.pl](mailto:skonpres@poczta.onet.pl)>. **Konstantaj kunlaborantoj**: Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko, (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facillingvaj artikoloj** estas verkita en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujare. **Anonctarifo**: Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas double. Por E-organizajoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30 %. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncoj**: por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifo**: varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj**: povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj**: Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvenco (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22.00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <[http://roi.orf.at/esperanto/es\\_demand.html](http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html)> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

# La sekva **KONTAKTO**-redaktoro prezentas sin

**Ekde la sekva numero **KONTAKTO** havas novan redaktoron! Paŭlo Moĵajev estas fidela kunlaboranto de **KONTAKTO**: ekde somero 2003 li estis ĉefprovlegisto, kaj ekde vintro 2006 – vic-redaktoro. Kaj nun estas lia vico transpreni la redaktoran torĉon!**



**– Unue – gratulojn pro via elekto kiel redaktoro de **KONTAKTO**, kaj dankon pro ĉiu via helpo kiel provlegisto kaj vicredaktoro! Bv. prezenti vin al niaj legantoj!**

– Mi estas Pavel (Paŭlo) Moĵajev, nun mi havas 26 jarojn. Ekde la naskiĝo mi loĝas en Krimeo (Ukrainio). Post fino de la mezlernejo mi studis en medicina universitato kaj poste specialiĝis pri kirurgio. Tamen post iom da praktika medicinista laboro mi preferis pli trankvilan sciencan kampon, do nun mi instruas anatomion kaj operacian kirurgion kaj okupiĝas pri sciencaj studoj.

**– Kiam (kaj kiel) vi esperantistiĝis?**

– Tio okazis tute hazarde. Somere 2000, kiam mi promenis en libra bazono, miajn okulojn trafis la komputila disko “Ni lernas Esperanton”. La disko, kiel mi eksciis poste, estis, fakte, ege fuŝe farita, tamen tie troviĝis, i.a., la lernolibro de Esperanto verkita de B. Kolker. Komence mi studis Esperanton pro nura scivolemo: al mi estis interese, kiel povas aspekti la arte-

farita lingvo. Mi rapide pasiĝis kaj trastudis la tutan lernolibron eĉ ne sciante, ĉu mi trovos iujn vivajn esperantistojn. Poste mi trovis multe da informoj pri kaj en Esperanto en la reto; kaj jam post tio mi eksciis, ke en mia propra urbo ekzistas aktiva E-klubo! Malpli ol jaron post la aĉeto de la disko mi jam partoprenis mian unuan E-aranĝon: ĝi estis “Aroma Jalto”, organizata en Krimeo ĉiumaje.

**– Rakontu iom pri via Esperanta vivo kaj agado – vi ja partoprenis en multaj projektoj, kaj ankaŭ mem iniciatis multon. Rakontu do pli pri viaj E-agadoj!**

– Nu, ne vere multon... Dum kelkaj jaroj mi organizis “tradiciajn” kursojn en Simferopolo. La rezultoj ne estis elstaraj, tamen kelkajn pli-malpli aktivajn esperantistojn mi ja kreis. Dum iom da tempo mi laboris pri la ruslingva instrua retlisto “Lernejo de Esperanto”; bedaŭrinde, mia iama entuziasmo pri ĝi iam elĉerpiĝis, sed mi esperas, ke tio estis bona kaj utila agado. Dank’ al Esperanto mi malkovris en mi la emon al arta tradukado; diversajn kanto-tradukojn mi plenumas dum miaj koncertoj; la plej bonaj el tiuj kantoj aperis ankaŭ forme de la disko “Pluke-Traduke”.

Sufiĉe multe mi tradukas ankaŭ proze, sed, ĝis nun neniu pli-malpli serioza traduko estas preta. Tamen mi esperas, ke mi sukcesos iam finfari la tradukon de la ruslingva klasikaĵo “Taras Bulba” de N. Gogol. Eblas aldoni ankaŭ, ke mi tradukis subtitolojn al kelkaj sovetiaj filmoj kaj dufoje kungvidis la seminarion “Flugiloj de malfacila vento” (dum IJK-oj en Rusio kaj Pollando).

Krome, lastatempe mi iom vikipediumas, ĉefe verkante pri Krimeo, ties urboj kaj vidindaĵoj.

**– Kiu estas viaj interesoj ekster la **Movado**?**

– Verdire, jam dum kelkaj jaroj Esperanto kiel lingvo kaj Esperantujo kiel organizo estas miaj plej grandaj interesoj kaj plej seriozaj eksterprofesiaj okupoj. Krome, mi ŝatas klasikan muzikon, rusan poezion kaj Krimean naturon.

**– Vi havas tre neordinaran (kaj malfacilegan!) okupon. Kial vi elektis ĝuste tiun ĉi profesionon?**

– Mi vere ne scias, tamen certas, ke tiun elekton mi faris jam en profunda infanaĝo. Kiam mi estis ankoraŭ tre malgranda infano, mi ege scivolis pri tio, kiel funkcias mia korpo. Nu, la infanaj revoj realiĝis, kaj nun mi scias pri la homa interno signife pli multe, ol la ordinara homo (*ridetas*). Medicino vere estas tre malfacila profesio, kaj mi ĝis nun ne bedaŭras, ke mi dediĉas mian tempon al instruado – ĝi estas iom malpli komplika (sed ne malpli respondeca kaj laciga) tasko!

**– Nun ni parolu pri **KONTAKTO**. Kiu estas viaj planoj kiel nova redaktoro de **KONTAKTO**?**

– La programo-minimumo estas ne malbonigi tion, kion sukcesis atingi vi (*ridetas*). Kompreneble, mi penos fari la revuon eĉ pli varia kaj interesa, ol ĝi estas nun, tamen ni ne forgesu, ke tiuj ecoj de la revuo dependas pli de la kontribuantoj, ol de la redaktoro. Al mi plaĉas **KONTAKTO** kiel prezentejo de la plej buntaj informoj kaj kiel interŝanĝejo de la plej neordinaraj ideoj – kaj mi kore alvokas ĉiujn legantojn de la revuo aktive informi unu la alian kaj interŝanĝi siajn ideojn!

Intervjuis Ĵenja Amis

## Temoj de la venontaj numeroj de **KONTAKTO**

**KONTAKTO** 220, 2007:4. KUNE – POR PLI BONA MONDO.

**KONTAKTO** 221, 2007:5. EKOLOGIO. Limdato: la unuan de oktobro.

Ni vivas en la mondo, rapide kaj aktive evoluanta. Bedaŭrinde, ne ĉiam la homaro sukcesas eviti la problemojn, kiujn kaŭzas ĝia tre rapida evoluo. Tial la demandoj, rilataj al la konservado de la ĉirkaŭa medio iĝas ĉiam pli kaj pli gravaj. Ni invitas la legantojn de **KONTAKTO** preparoli diversajn aspektojn de ekologio kaj medi-konservado en la plej larĝa senco de tiuj vortoj. Rakontu pri viaj spertoj preventi la ekologiajn proble-

mojn, komuniku pri tio, kio (ne) estas farata en via lando por eviti la ekologian krizon. La temo estas vasta kaj ege grava – do partoprenu, diskutu kaj diskutigu!

**KONTAKTO** 222, 2007:6. LITERATURO. Limdato: unuan de novembro.

La legantoj de **KONTAKTO** estas invitataj paroli pri literaturo. Temas kaj pri la literaturo ĝenerale (historio, skoloj, problemoj), kaj pri apartaj literaturaj verkoj. Rakontu pri la famaj verkoj, aperintaj en via gepatra lingvo – alilandanoj, kiuj plej ofte konatiĝas kun la tradukoj, ofte ne scias kaj ne komprenas la detalojn kaj nuancojn de la verko,

por ne paroli jam pri la historia fono kaj kaŝita enhavo. Per Esperanto interŝanĝu la informojn pri la nacilingva literaturo! La informoj pri malmulte konataj verkoj aŭ pri literaturaj en “malgrandaj” lingvoj estas aparte interesaj!

Kiel ĉiam, ajnatemaj kontribuoj kaj proponoj estas bonvenaj!

**Atenton! La poŝta adreso de **KONTAKTO** ŝanĝiĝis! Ekde nun sendu viajn paperajn kontribuojn al:**

**Pavel Moĵajev (**KONTAKTO**)  
ul. Rabochaja 24, kv. 29  
Jalto, Krimeo**

**UA-98612, Ukrainio**

**La reta adreso estas ĉiam la sama:  
<kontakt@tejo.org>**



EL LA ŜTATA MUZEO PRI ORIENTA ARTO, MOSKVO (EL WWW.ROERICH.ORG)

# “Vivas en Hindujo Beleco...”

## Aziaj misteroj de Nikolao Roerich

Julija Patlanj, Ukrainio

Ĉi-jare oni festas multe da memorindaj datoj, kiuj rilatas al mondfama familio de rusa pentristo, verkisto, filozofo kaj vojaĝanto Nikolao Roerich [rerih] (1874 – 1947) kaj al la fabela lando Hindio. Ekzemple, antaŭ 60 jaroj, maje 1947 Hindio iĝis sendependa lando. Samjare, la 12-an de decembro mortis Nikolao Roerich, “granda rusa amiko de Hindio” (oni eĉ nomis lin Mahatmo – “granda animo”, same kiel Gandhi). Antaŭ 105 jaroj naskiĝis la pli aĝa filo de N. Roerich, fama orientologo Georgo (*Jurij*) Roerich (1902 – 1960). En 1957, ĝuste antaŭ 50 jaroj, Georgo Roerich revenis el Hindio, kie li loĝis dum multaj jardekoj, en sian naskiĝlandon – tiam Sovetunion. Li estis unu el la plej elstaraj fakuloj pri raraj orientaj lingvoj, kaj ne nur. En unu artikolo pri li mi trovis la jenan opinion: “Georgo Roerich havis mirindan talenton – li komprenis preskaŭ ĉiujn lingvojn de la mondo, kaj dekojn da lingvoj li posedis perfekte”. Nu certe, tio estas iom troigita eldiro, sed jam 19-jara li vigle posedis kvin eŭropajn lingvojn!

### Ekspedicie tra Azio

Oni konas lian mondfaman patron precipe kiel elstaran pentriston – li brile pentris Himalajajn montojn. Ne tre

multaj nun scias, ke dum la jaroj 1924-28 la familio de Roerich – Nikolao, lia edzino Helena kaj ilia filo Georgo, faris grandan sciencan kaj artan Centr-Azian ekspedicion por esplori Hindion, Ĉinion, Siberion, Mongolion kaj Tibeton. Dum tiuj kvin jaroj Nikolao Roerich kreis preskaŭ 500 pentraĵojn! Sed ne nur tio estis grava celo de la ekspedicio.

“Estis en ĝi iu mistera mekanismo kun strangaj internaj leĝoj”, – akcentas direktorino de Muzeo de N. Roerich en Moskvo s-ino Ludmila Ŝapoŝnikova. Ŝi konkludis, ke la ekspedicio esploris la sencan de la homara evoluo. La familio de Roerich serĉis en Centra Azio la fonton de la homaj scioj, artoj kaj sciencoj – la misteran landon *Ŝambala*. Tri enigmaj temoj – la mistera lando Ŝambala, la Saĝuloj, kiuj loĝas en ĝi, kaj Ŝtonometeor – kiel grava motivo konstante ripetigis en la voja taglibro de Nikolao Roerich “Altajo-Himalajo”. La admirindaj pentraĵoj, kiujn Nikolao Roerich kreis en la ekspedicio kaj poste, kiam ĝi estas jam finita, enhavis tiujn temojn kaj faris el ili ion kvazaŭ duon-realan, sed samtempe konservis la antikvajn legendajn aŭ eĉ fabelajn sencojn de ili.

Ĝi estis la mondo misterplena kaj mirinda, kie abundis brilaj koloroj de la montoj. La

montoj altis super la tero kiel neĝaj grandeguloj. Nubetoj kaj perlataj nebuloj kovris la strangajn liniojn de la montaj vicoj kaj donis al ili nekompreneblan ravan delikatecon...

La pentraĵoj de Nikolao Roerich, same kiel lia libro “Ŝambala Brilanta”, enhavas kvazaŭ tri tavolojn: la tavolon de mitoj aŭ legendoj, la historian tavolon kaj la tavolon de la realo, kiun spertis la familio mem de Roerich. Tre ofte por la esploristoj estas malfacile aŭ tute neeble distingi tiujn tavolojn.

### La mistera lando

“Lamao, rakontu al mi pri Ŝambala!” – jen estas la komenco de la skizo de Roerich “Ŝambala Brilanta” (1928). “Sed vi, okcidentanoj, nenion ja scias pri Ŝambala kaj eĉ ne volis ion scii. Eble, vi demandas nur pro simpla scivolemo, kaj vane eldiras tiun sanktan vorton”. “Lamao, mi ne demandas pri Ŝambala sencele. Ĉie la homoj konas tiun grandan simbolon sub diversaj nomoj. Niaj sciencistoj serĉadas ajnan fajrerojn de la scio pri tiu mirinda loko...”

Al Roerich bonŝancis kolekti multajn legendojn, mitojn, rakontojn pri la Mistera Lando, kiu estas enigme nomata Ŝambala. Li mencias ĉi tie la plej gravajn Leĝojn de la Universo. Jen estas kelkaj el ili: “Instruado estas la plej alta ligo, kiu estas atingebla en niaj

teraj vestoj. Nin kondukas Instruistoj, kaj ni aspiras perfektecon en nia estimo al la Instruisto”. Certe, ĉi tie temas pri la tiel nomataj Spiritaj Instruistoj de la Oriento, sed ne nur... Kiam la familio de Roerich loĝis en Hindio, ĝi aktive kunlaboris kun mirinda grupo de la hindiaj Instruistoj. Kiel rezulto de tiu kunlaboro aperis serio de la libroj pri Agni-Jogo (alia titolo de ĝi estas “Viva Etiko”).

“Proksimiĝas la granda epoko. La Reĝo de la Mondo estas preta por batalado. Multaj signoj aperadas. La Fajro de la Kosmo denove alproksimiĝas al la Tero. Planedoj profetas la novan eraon... Oni denove kontrolas la homaron por certiĝi, ĉu ĝia spirito estas sufiĉe evoluinta”. Roerich parolas pri la estonta evoluo de la homaro. Li notis en la taglibro: “Oni verkas alian historion de la mondo, pri kiu ne scias la historiistoj...”

### Oriento kaj Okcidento

La ekspedicio de Roerich dum kvin jaroj trapasis grandegajn vastajn kaj nekonatajn al eŭropanoj landojn de Centra Azio, la plej antikvan parton de nia planedo. Tiu sperto alkondukis la pentriston kaj filozofon al la gravaj pensoj pri la Oriento kaj Okcidento. Ja vere ekzistas iu kultura kaj historia limo, kiu dividis nian planedon je du

partoj – Oriento kaj Okcidento. Kaj ĉiu el ili havis propran evoluon signifon, foje montrante al ĉiuj, ke sintezo de la kulturoj kaj interagado kondukas al disfloro kaj progreso, la foresto de ili – male. Interagado de la Oriento kaj Okcidento estas bazita sur la sama mekanismo, kiel la hemisferoj de la homa cerbo. Tial do la problemo mem pri la ekzisto de Oriento kaj Okcidento, certe, havas evoluon signifon. Kiam Nikolao Roerich verkis siajn aziajn skizojn, tre malmultaj homoj sur nia Tero komprenis la gravan signifon de la interagado de Oriento kaj Okcidento. Roerich estis certa, ke la mondfamaj vortoj de Kipling pri tio, ke renkontiĝo inter Okcidento kaj Oriento estas neebla, ekzigis jam antaŭ longe, ĉar “la limoj de la spirita vivo plivastiĝas kaj la fizikaj limoj iĝas pli flekseblaj. La ideo pri Oriento kaj Okcidento kiel pri ĝemeloj, kiuj neniam renkontiĝos – por nia penso jam estas tre arkaika ideo”. “Okcidento povas facile kompreni la plej gravajn ideojn de la Oriento kaj konservi eternan saĝecon, kiu devenas el tiu parto de la mondo, de kie fakte devenis ĉiuj religioj kaj instruoj. Kaj granda Oriento sekvos la malkovrojn de la Okcidento kaj alte taksos ĝin”.

Pri tiu mistera Oriento oni povas paroli preskaŭ senfine. Ĉi tiuj ideoj de N. Roerich multe similas al tiuj de L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, pri la nova proponita de li instruo – homaranismo – por ĉiuj homoj de la mondo.


### Ĉu ligo al Esperanto?

Estas ege interesa kaj malmulte konata fakto, ke en la serio de la libroj “Viva Etiko” estas kelkaj vortoj de la Instruistoj de la Oriento pri la “komuna lingvo”. Jen ili: “Tiel oni povas observi nemalmultan kvanton de la taskoj, kiuj estis senditaj al la homaro diverstempe. /.../ Delonge ekzistas la revo pri la monda lingvo. Nur tiamaniere oni

povas defendi purecon de ĉiuj lingvoj. Ĉiu povas koni sian propran lingvon kaj la mondan, tiel eblas trovi la plej bonan formon por la homaj kontaktoj. /.../ Tiel Ni faras la vojon...” (Frataro (*Bratstvo*), II, §49). Do, eble ankaŭ la apero de Esperanto okazis laŭ la volo de tiuj misteraj Instruistoj de la Oriento? Dume mi ne scias, ĉu iu el la familio de Roerich posedis E-on. Sed mi trovis en la jam menciita taglibro de la ekspedicio “Altajo-Himalajo” unu noton de Nikolao Roerich: “Kiel neatindita amiko aperis esperantisto en *Urga* (nuna Ulanbatoro, Mongolio)” (p. 234). Laŭ miaj supozoj, ĉi tie temas pri la unua mongola E-isto Ĥajan Ĥirob Namĝilob. Jen kelkaj aldonaj vortoj pri li el la “Enciklopedio de Esperanto”: “Mongolo, unua pioniro de E-o inter mongoloj. Esperantistiĝis dum sia vojaĝo en fremdaj landoj – Turklando, Sovetunio (1920–23). Reveninte Mongolujon en 1924, li propagandis tie E-on laŭpove en malfacilaj kulturkondiĉoj de sia nomada lando kiel estro de lernejo de la popolrevolucia partio en la ĉefurbo Ulan-Bator-Ĥoto (*Urga*)” (EdE, p. 234). El la aliaj fontoj mi scias, kvankam ne tiel klare, kiel mi volus, ke Ĥajan Ĥirob estis arestita kaj

kondamnita en la jaro 1937.

Sed dume estis nur 1927, kaj la familio de Roerich vizitis Ulan-Bator-Ĥoton, ĉefurbon de Mongolio. Tie okazis la jena interesa okazaĵo (laŭ la rememoroj de usonanino Zinaida Fosdik): “Mi devas diri, ke en Mongolio oni akceptis Roerichon kiel senditon de Ŝambala, parte ĉar li donacis al la mongolia registaro sian pentraĵon “La granda rajdanto”. Ĝi prezentas la Reĝon de Ŝambala Rigden Dĵapo en ruĝaj vestoj fone de la montoj /.../ baldaŭ post nia alveno la domon de Roerich-oj vizitis la milita ministro de Mongolio. /.../ “Zina, – diris al mi ŝerce Helena Roerich, – dum antaŭnelonga enkorpiĝo vi estis mongolino. Se ni vestos vin per mongolaj vestoj, la gasto certe pensos, ke vi estas lia samlandanino”. Kaj vere: eniris la ministro, ekvidis min kaj tuj turnis sin al mi, salutante min en la mongola lingvo. Certe, ĝin ne nur mi – neniun komprenis, krom Georgo (Roerich). Ĉiuj konversacioj okazis pere de li. Sed la milita ministro posedis krom la mongolan ankoraŭ unu lingvon, kiun mi, ve, ne konis – Esperanton. Li petis min transdoni al usonaj E-istoj lian saluton, skribitan en Esperanto. Tiu saluto, kiu venis el tiom izolita kaj malproksima anguleto de la



Nikolao Roerich en Naggar, Hindio

tero, kiel Ulan-Bator, ekscitis poste en Usono ŝtorman triumfon...”.

Mi planas daŭrigi la esplorojn pri tiu ĉi temo, kaj mi certas, ke sur tiu vojo nin atendas multe da enigmoj. Antaŭnelonge mi eksciis, ke Nikolao Roerich havis unu konaton, kiu antaŭe laboris en la Pekina Esperanta Kolegio kune kun fama Esperanta verkisto Vasilij Eroŝenko. Temas pri orientologo kaj fervora esperantisto Grigorij Sofoklov, kiu en la jaro 1934 ĉeestis la kunsidon de “Harbina Rusia Komitato de Pakto de Roerich”, kiun vizitis ankaŭ la pentristo mem.

La pentraĵoj: (supre) Laocio; (malsupre) La monto de kvin trezoroj (Du Mondo).



EL LA MUZEO DE ROERICH, NOVJORKO (EL WWW.ROERICH.ORG)



## Mondvojaĝanto Marino Curnis: “Klopodu esti feliĉa!”

Marino Curnis estas jam konata al multaj esperantistoj pro multaj artikoloj en la Esperanto-gazetaro. Ankaŭ al legantoj de *KONTAKTO* Marino estas konata ekde la komenco de lia unika vojaĝo *Pedibus Calcantibus* – “Per piedoj, kiuj premas [la teron]”. Marino planis trairi Eŭropon kaj Azion per piedoj – de Italio al Japanio kaj reen – dum kvin jaroj, sed dumvoje li spertis certajn problemojn... Dum lia deviga halto ni kaptis la okazon denove intervjui Marino-n por *KONTAKTO*!

– Unue mi volas danki vin pro via dua intervjuo por *KONTAKTO*! Mi ĉiam kun granda intereso legis viajn vojaĝajn leterojn kaj rigardis viajn fotojn en diversaj Esperantaj revuoj – kaj mi neniam ĉesis miri pri via kuraĝo kaj via grandega volo kaj laboro realigi vian Revon! Mi ankaŭ ĉiel deziris, ke vi finfine venku ĉiujn tiujn aĉajn burokrataĵojn kaj denove estu sur la vojo de via revo... Kio do finfine okazis?

– Dankon pro viaj bondeziroj! Bedaŭrinde, okazis tio, ke mi ne sukcesis ricevi la vizojn, kiuj donus al mi sufiĉe da tempo por piediri tra la landoj de Irano ĝis Japanio. Mi ne sukcesis ricevi ilin antaŭ mia ekiro, ĉar neniu el la politikistoj (politikistaĉoj!) respondis al miaj leteroj (mi skribis al ambasadejoj kaj konsulejoj de la trapasotaj landoj, al multaj ministerioj pri eksterlandaj aferoj, al turismaj oficejoj kaj eĉ al ĉiu Eŭropa parlamentano, sed neniu respondis!). Tial mi ekiris, esperante ricevi la vizojn jam dum la vojaĝo. Irano donis al mi nur unu-monatan vizon, kaj mi decidis iri aŭtobuse en Teheranon, kie troviĝas la Itala ambasadejo kaj la

ambasadejoj de la kvin sekvaj ŝtatoj sur mia itinero (Turkmenio, Uzbekio, Taĝikio, Kirgizio kaj Ĉinio), por peti la vizojn. Tamen ili eĉ ne aŭskultis min... Do, mi malĝoĝiĝis kaj, post iom da insistado, decidis reveni en Italion per aviadilo.

– Kiuj estas viaj planoj nun? Ĉu vi tamen daŭrigos la vojaĝon de la mezo, sen eniri certajn landojn – aŭ ĉu (mi eĉ ne volas skribi tiujn vortojn) tio estos la lasta etapo de *Pedibus*?..

– Post mia reveno en Italion, iu senatano petis la ministron pri eksterlandaj aferoj helpi al mi. La ministro povas respondi



dum ses monatoj, ĝis septembro. Se oni tamen donos al mi la bezonatajn vizojn, mi daŭrigos mian vojaĝon el Irano.

– Oni diras, ke en ĉiu malbono estas parto de bono. Do, ĉu estas “io bona” en la fakto, ke vi estis devigita interrompi vian vojaĝon?

– Eble jes, sed mi ĝis nun ne malkovris, kio tio estas. Unu afero tamen okazis: post mia reveno mi trovis, ke mi ne plu havas fianĉinon (min devis atendi la virino, kiun mi renkontis dum la vojaĝo), ĉar io misis. Mi opinias, ke tio estas bona: imagu, se

mi revenus post kvin jaroj kaj nur tiam ni malkovrus, ke ni ne taŭgas unu al la alia!

– Do bone, ni parolu pri la vojaĝo mem. Ĉu viaj originalaj planoj (kiel itinero) kaj la realo de la vojaĝo estis sufiĉe similaj, aŭ ĉu multo ŝanĝiĝis laŭ la “fluo”?

– La originalaj planoj kaj celoj ne tro ŝanĝiĝis: mi faris la vojaĝon plene laŭ miaj deziroj kaj laŭ mia maniero; kaj la vojaĝo donis al mi tre multe! Nur burokratio, politikistaĉoj kaj doganoj donis zorgojn kaj malhelpis mian vojaĝon – unuvorte, nur la potenculoj kaj iliaj serviluloj. La mondo estus pli bona sen ili. Se ne konsideri ilin, mi renkontis multajn bonajn homojn, kiuj faras la mondon bonega!

– Mi certas, ke ĉiu momento de via vojaĝo estis unika. Sed se vi devus elekti kelkajn plej-plej elstarajn momentojn de via vojaĝo (en la pozitiva senco), kiuj ili estus?

– Ĉiu intervjuo havas tiun ĉi demandon (*ridetas*). Sed ĉiu intervjuo, kiel vi mem diris, enhavas ankaŭ la respondon: ĉiu momento de mia vojaĝo estis unika kaj vivas en mia koro. Ejoj, gustoj, odoroj, sonoj, sed ĉefe la personoj!

– Kaj kio estis la plej malfacilaj momentoj de la vojaĝo? Ĉu kelkfoje okazis ankaŭ miskomprenoj?

– Kiel mi jam diris supre, nur la senutilaj kaj sensencaj leĝoj de potenculoj estis la problemo. Ĉio alia estas ne vera problemo, sed nur parto de la vojaĝo, parto de la travivaĵoj.

– Vi planis verki libron pri la vojaĝo – kiel statas la verkado?

– Ĝis nun mi ne havis la deziron verki novan libron. Fakte, mi skribis la taglibron dum vojaĝo de Italio al Turkio, kaj ankaŭ dum atendado de Irana vizo en Erzurum (Turkio). Mi devas ĝin relegi, ordigi kaj kompletigi. Krome, mi bezonas instigon fare de eldonisto. Se mi havus proponon de iu eldonisto, mi kompletigus la libron (kiun mi titolus “La piedpremita revo”) pli facile kaj trankvile. Se mi trovas la eldoniston, mi povus publikigi ĝin eĉ Esperante.

– Kaj laste – kio estas la plej signifa leciono, kiun vi ricevis dank’ al *Pedibus*? Ĉu ĝi iel ŝanĝis vian personan vivon? Se jes, kiel?

– Pro *Eurasia Pedibus Calcantibus* mia esenco ricevis tre multe. Unue, mi pli bone sentas la Naturon. Ni estas parto de ĝi. Ni hodiaŭ forgesas tion, kaj opinias, ke solvo de ĉio estas nur mono. Sed estas la Naturo, kiu havas solvojn por ĉio. Ne timu ĝin! Due, mi komprenis, ke ĉio

havas iun signifon. Ofte ni ne povas ĝin kompreni, tamen ĝi ekzistas. Mi spertis, ke se ni konfidis nin al tio, tio zorgas pri ni. Respektu tion, respektu ĉiun, ĉion! Kaj klopodu esti feliĉa!

Fotoj: kompleze de Marino Curnis.

Intervjuis Ĵenja Amis

### <Legu>

Ĝeneralaj informoj pri la projekto estas ĉe la paĝo <<http://www.eurasiapc.com>> (ankaŭ Esperante)

Vi povas ekscii pli pri Marino Curnis ĉe <<http://www.eurasiapc.com/02Espera/03Miestas.htm>>. Aboni la novaĵletonon pri la vojaĝo eblas ĉe <<http://www.eurasiapc.com/Condivis/Giornalino.htm>>.

Vi povas ankaŭ rekte kontakti Marinon – <[info@eurasiapc.com](mailto:info@eurasiapc.com)> aŭ per la blogo: <<http://blog.vagabondo.net>>.



# Helena Blavatsky

Ursula Grattapaglia, Germanio/Brazilo

**Ĉiuj idealismaj movadoj baziĝas unuavice sur individua kuraĝo. Defii la sociajn, religiajn aŭ politikajn tradiciojn por atingi la pens-liberecon pro nura konvinkiteco pri siaj idealoj ne estas ĉiutaga afero. La virina voĉo en la deknaŭa jarcento, kiu invitis al universala frateco kaj al tolerema sinteno, celebrante la diversecon de la kulturaj tradicioj, certe devis esti la voĉo de kuraĝa virino.**

Helena Petrovna Blavatsky [blavacki] naskiĝis la 12-an de aŭgusto 1831 en Ukrainio. Ŝia patro estis kolonelo Peter von Hahn; ŝia patrino, Helena Andrejevna, estis fama verkistino (kune kun George Sand kaj la grafino Ida Hahn-Hahn el Germanio ŝi estas unu el tiuj, al kiuj ni ŝuldas la komencon de la virina konsciigo kaj la batalo por la seksa samrajteco). Ekde la juneco la patrino stimulis en Helena nekonformismon al la rigida ortodoksa socia ordo. La avino de Helena, princino Helena Pavlovna, jam komence de la deknaŭa jarcento iĝis fama pro sia idealisma dediĉo al la sociaj marĝenuloj, ĉefe al malriĉaj infanoj.

Dum ŝia familio zorgis pri sociaj kaj ekonomiaj reformoj, Helena decidis batali por novtipa morala kaj etika reformo sur la spirita kampo, reproponante la eternan saĝecon de la antikvaj grandaj majstroj, inkluzive la reprezentantojn de la orientaj filozofioj. Ŝi jam tiutempe ŝipe vojaĝis inter Hindio, Usono, Egiptio kaj Britio. Vere eksterordinara fakto por sola virino!

En Novjorko en 1875 ŝi kun aliaj idealis-

maj avangardaj personoj fondis la Teozofian Societon, kiu havas nuntempe studrondojn en multaj landoj en ĉiuj kontinentoj. La celojn de la teozofia societo eblas resumi jene:

1. Formi la kernon por la tutmonda frateco sen distingo de raso, kredo aŭ sekso;
2. Kuraĝigi la studojn pri kompara religio, filozofio kaj scienco;
3. Esplori la neklarigitajn leĝojn de la naturo kaj la latentajn kapablojn de la homo.

La teozofio, pri kiu Helena daŭre parolis kaj verkis, reprezentas kombinaĵon de valoroj, kiujn serĉas tiuj, kiuj rifuzas la ortodoksismon kaj emas individue serĉi la veron en intelekta libereco sen dogmoj. Fakte, la teozofio studas ĉiujn demandojn pri la spirita parto de la homa vivo surbaze de respekto al la diverseco, sen antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj. Ĝi komparas la diversajn religiojn kaj la komunajn verojn. La vivo en la universo estas granda kaj profunda mistero, kiun ĉiu individuo por si mem devas malkovri laŭ siaj propraj kapablo kaj kompreno.

Hodiaŭ la teozofio estas ĝardeno, kiu kultivas la homan liberecon, la diversecon, la pacon, la fratecon, la senteblecon kaj la solidarecon. Fakte, ne malgranda kvanto de Esperanto-parolantoj dediĉas siajn liberajn horojn al teozofiaj studoj, ĉar la idealoj de ambaŭ movadoj sekvis paralelajn vojojn, spertis la samajn persekutojn kaj strebas atingi la saman ŝtupon de la homar-evoluo, kie pli laŭte parolus la solidareco, la respekto al la diverseco kaj entute la homaranismaj konceptoj.



Se vi volas kompreni la spiritan dimensio de la nuna tutmondiĝo al globa civilizacio, legu la grandiozajn verkojn de Helena Blavatsky, skribitajn antaŭ pli ol cent jaroj kaj ankoraŭ aktualajn nuntempe. Ŝi ne nur antaŭvidis, sed eĉ inspiris multajn sciencajn eltrovojn de la dudeka jarcento. Ŝiaj plej signifaj verkoj profunde influis la famulojn kiel Thomas A. Edison, Albert Einstein, David Bohm, James Joyce, Fernando Pessoa, Annie Besant, Alice Bailey kaj Gustav Mahler. La rilatoj inter la homoj kaj la naturo, la saĝa uzo de la medio estis gravaj temoj en la verkoj de Helena Blavatsky.

Helena instigis kaj daŭre instigas la homojn fari demandojn kaj serioze serĉi la respondojn al la demandoj ĝis nun ne responditaj.

# Supernaturaj fenomenoj: ĉu ili ekzistas?

Wendel Teles Pontes, Brazilo

**Tabloj kaj mebloj levigas kaj moviĝas per si mem. Oni aŭdas voĉojn de nenie. Bruo kaj vento aŭdiĝas kaj sentiĝas, malgraŭ tio, ke ĉiuj pordoj kaj fenestroj estas fermitaj. Ĉiuj loĝantoj timegas la nekonatan forton, kiu movas la objektojn en la ĉambro. Oni preĝadas kaj petas la dian helpo kontraŭ tiu satana forto. Iom poste la domon regas silento kaj nenio stranga okazas plu... ĝis la sekva tago!**

Ĉu tiu sceno estas parto de horor-filmo? Jes, kompreneble. Sed ĝi estas bazita ankaŭ sur raportoj, faritaj de homoj, kiuj reale travivis similan okazaĵon. Strangaj fenomenoj ĉiam maloftis, sed kiam ili okazis, oni preferis simple ignori ilin anstataŭ konsideri kaj pristudi.

Homoj ne kredas je la ekzisto de tiaj aferoj. Ili simple diras, ke tio ne povas okazi pro naturaj konataj fortoj. Kaj ili ja pravas – tiujn fenomenojn oni atribuas al la ankoraŭ nekonataj fortoj.

## La unuaj faktoj

La homoj komencis studi tiujn strangajojn pli-malpli serioze nur ekde 1848, kiam la membroj de honesta familio Fox el la urbo Hydesville (Usono) iĝis atestantoj de la scenoj similaj al la prezentitaj komence de tiu ĉi artikolo. Malgraŭ la timo antaŭ la nekonataĵo la infanoj decidis alfronti la “forton”, kaj la 31-an de marto 1848 ili komencis la interparolon pere de bat-komunikado (ekzemple, unu sonbato signifis la vorton “jes” kaj du sonbatoj signifis “ne”). Post iom da tempo la infanoj eksciis, ke la “nevideblaĵo” estis homo nomata Charles Rosma, murdita kaj enterigita tie, en la domo.

La fenomeno estis observebla nur en la ĉeesto de la filinoj, la famaj “Fratinoj Fox”. Pro tio, ke oni kredis, ke tiuj “specialaj” homoj respondecas pri tiuj supernaturaj fenomenoj, oni nomis ilin “mediumoj” (tiuj, kiuj estas “perantoj” inter la vivuloj kaj mortintoj). La fenomeno mem (strangaj aferoj, kiuj okazas en specifa loko aŭ domo) ricevis la nomon *Poltergeist* (“brua spirito” germane – ĉar oni atribuis la kaŭzon de batoj kaj bruo al spiritoj). Per tiu epizodo komenciĝis la granda erao de moderna spiritismo.

## Komenco de la unuaj seriozaj studoj

Tiuj fenomenoj tiom influis la socion, ke sciencistoj estis kunvokitaj studi ilin por konstati, ĉu ili estas realaĵo aŭ nur trompo. Multaj homoj ne konfirmis la realecon de tiuj okazaĵoj, tamen kelkaj ja konkludis, ke tiuj fenomenoj fakte estis vero.

Unu el la plej famaj esploristoj de tiuj fenomenoj estis fama brita kemiisto William Crookes (1832-1919), kiu studis la “fantomon”, kiu videbligis sin helpe de juna mediumo Florence Cook (1856-1904). Dum tri jaroj tiu fantomo aperis kaj konversaciis kun la sciencisto kaj tiuj homoj, kiujn li invitis. Oni fotis la fantomon, kaj post la fino de la esploroj la sciencisto publikigis la rezultojn. Malgraŭ la rezisto flanke de la plejmulto, li publike konfesis, ke tiu fantomo ne estas produkto de trompo flanke de la junulino. Ĝi vere estis “iu stranga formo”, kiu kapablas aperi kaj malaperi. Multaj ne kredis lin, malgraŭ lia respektindeco, kaj lia reputacio estis makulita, pro kio li poste silentis pri tiu temo dum multaj jaroj.

Diversaj aliaj altranguloj studadis tiujn strangajn energiojn, inter ili estis akademianoj, juĝistoj, kuracistoj, sciencistoj ktp. Multaj trafis trompaĵojn, dum la aliaj malkovris verajn nenormalajn fenomenojn. Grupo de eminentuloj eĉ fondis specialan instituton por studi ilin – la t.n. SPR (el la angla *Society for Psychical Research* – Societo pri Prikaj Esploroj), kiu ekzistas ĝis nun kaj kolektas multege da raportoj kaj informoj pri tiuj fenomenoj.

Hodiaŭ tiuj, kiuj studas tiajn aferojn, nomiĝas parapsikologiistoj (laŭ la nomenklaturon kreita de Joseph Banks Rhine, kiu enkondukis la statistikajn metodojn por la esplorado de tiuj fenomenoj). Multaj homoj, malgraŭ tio, ke ili studas la samajn fenomenojn, havas diversajn opiniojn pri iliaj kaŭzoj. Religiemuloj atribuas ilin al la forto de la spiritoj (mortintaj homoj), dum la aliaj kredas, ke tiuj fenomenoj estas provokataj de subkonscio kaj nekonkscio de la vivantoj.

Multaj milionoj da paĝoj estis verkitaj pri la mediumoj, kiuj kapablas fari tion, kio ne eblas por la aliaj. Inter ili elstaras skotlandano Daniel Dunglas Home (1833-1886), en kies ĉeesto moviĝis pezaj mebloj kaj kiuj

kapablis levigi antaŭ multaj homoj; Eusapia Palladino (1854-1918), itala mediumo, unu el la plej bone studitaj mediumoj en la tuta historio; Rudi Schneider (1908-1957) kaj lia frato Willy el Aŭstrio; Carlos Mirabelli (1889-1951), Francisco Xavier (1910-2002), Peixotinho (1905-1966) el Brazilo; Eleonor Piper (1859-1950), Henry Slade (1836-1910), Mina “Margery” Crandon (1888-1941) el Usono; Elisabeth D’Ésperance (1852-1918), Gladys Osborne Leonard (1884-1968), Stainton Moses (1839-1892) el Britio; Franek Kluski (1874-1944), Jean Guzik (1875-1928) el Pollando; Nina Kulagina el Rusio kaj multaj aliaj.

## Ektoplasmo

Movi objektojn kaj aperigi fantomojn eblas nur per speciala substanco, nomata ektoplasmo. La nomon kreis Charles Richet el Francio. Li konstatis, ke ĉe multaj mediumoj el la buŝo kaj naturaj aperturoj elverŝiĝas stranga (ofte blanka) substanco. Multaj sciencistoj studis kaj ankaŭ fotis ĝin. Inter tiuj menciindas Albert Schrenck-Notzing kaj Charles Richet, kiuj studis la ektoplasmon de Eva Carriere; William Crawford, kiu laboris kun la mediumo Katheleen Goligher; Glen Hamilton, kiu fotis kaj studis la substancan kun mediumo, kies kaŝnomo estis Maria M.

Tiu substanco ofte similas al tukopeco. Malmultaj mediumoj kapablas videbligi la ektoplasmon; plejfoje ĝi restas nevidebla, ĉar por ĝia apero bezonatas tre delikataj kondiĉoj (ekz., absoluta mallumo). Pro tio multaj homoj kredis, ke la mediumoj uzis la mallumon dum la spiritismaj seancoj por trompi la partoprenantojn. Preskaŭ ĉiuj mediumoj estis akuzitaj pri trompo, sed en multaj okazoj tiu trompo tute ne estis pruvita.

## Parapsikologio nuntempe

Ekde Joseph Banks Rhine dum studado de la parapsikologiaj fenomenoj oni vaste aplikas la statistikajn metodojn. Vaste konataj estas la t.n. kartoj de Zenner. Ili estas kvin kartoj kun diversaj bildoj: kvadrato, kruco, ondoj, stelo kaj cirklo; en kompleto estas 25 kartoj, do ĉiu bildo ripetiĝas kvin-foje. Oni esploras la supernaturajn kapablojn de la homo, petante lin diveni la bildon de sekva karto. Post la eksperimento oni uzas statistikon por kontroli, ĉu li trafis pli ofte, ol se li trafus per simpla hazardo. Se jes, ni povas konkludi, ke li “perceptis” la bildojn per iu alia senso (ekster la naturaj kvin, kiujn havas ĉiuj). La plejmulto de la eksperimentoj, farataj hodiaŭ, estas variaĵoj de tiu ĉi prin-





Fratinoj Fox

cipo, tamen, kompreneble, kun uzo de modernaj teknologioj kaj aparatoj.

Parapsikologio povas esti dividita en du grandajn branĉojn. La unua studas la

mensajn fenomenojn, ekz. menslegadon, antaŭvidon, percepton de informo per nenaturaj sensoj. La dua studas la fizikajn fenomenojn, ekz. movadon de objektoj per nura mensoforto (tiu fenomeno estas ofte nomata psiko- aŭ telekinezo). Oni povas aranĝi laboratorian eksperimenton, uzante volontulojn por provoki, aperigi iun nenaturan fenomenon, aŭ fari “kam-pajn” esplorojn por studi la spontaneajn fenomenojn.

Multaj fakuloj, reprezentantoj de la plej diversaj branĉoj de la homa scio, studas la parapsikologiajn fenomenojn; ekzistas ankaŭ kelkaj famaj institutoj, kiuj dediĉas sian laboron por studado de tiuj fenomenoj. Inter ili oni povas nomi la jam menciitan SPR, la Parapsikologian Fondadon (*Parapsychology Foundation*) kaj *Koestler Parapsychology Unit*, kiu estas parto de la Psikologia Departamento de la Universitato de Edinburgo. Malgraŭ la rezisto flanke de multaj ortodoksuloj, kiuj ne konsideras parapsikologion seriozaĵo,

la altrangeco de la profesiuloj kaj eminentuloj, kiuj interesiĝas pri ĝi kaj esploras ĝin, montras la malon aŭ almenaŭ pensigas pri la afero. Vere, la grandega kvanto de dokumentoj kaj eksperimentoj pri parapsikologio, kolektitaj kaj faritaj dum pli ol 100 jaroj, ne povas esti simple ignorita.

La aŭtoro studas biologion kaj parapsikologion kaj kunlaboras kun IPPP (*Instituto Pernambucano de Pesquisas Psicobiofísicas*, Pernambuka Instituto pri Psikobiofizikaj Esploroj). Li ĝojos ricevi mesaĝojn de la legantoj, kiuj spertis tiajn fenomenojn. Oni povas kontakti la aŭtoron per <pontes666@yahoo.com.br>.

### <Legu>

Parapsikologia Fondaĵo <<http://www.parapsychology.org>> (angle)  
Koestler Parapsychology Unit <<http://moebius.psy.ed.ac.uk>> (angle)  
SPR – *Society for Psychical Research* <<http://www.spr.ac.uk>> (angle)  
Hejmpaĝo de IPPP <<http://www.parapsicologia.org.br>> (portugale kaj angle)

## Monstroj de la lago Kanas

Alice Liu, Ĉinio

Post-tag-meze la sepan de junio 2005 sep turistoj gaje veturis sur la akvo de la lago Kanas per motor-boato. Subite ili ekvidis, ke ĉirkaŭ 200 metrojn antaŭ ili aperis granda ondo, kaj du nekonataj objektoj (proksimume dek metrojn longaj) rapide naĝis al la mezo de la lago, lasante post si longan spuron, same kiel motorboato. Preskaŭ du minutojn poste la objektoj malaperis de sur la akvo. Unu el la turistoj sukcesis filmi tiun ĉi strangan okazaĵon. Sekvatage la prezentaĵo ripetiĝis.

En la regiono Xinjiang, kiu troviĝas en nordo de Ĉinio, ekzistas la lago Kanas, kiu estas fama pro siaj belaj vidaĵoj kaj misteraj monstroj, pri kiuj oni rakontas jam delonge. La okazaĵoj, kompreneble, diversempe ricevis plej diversajn klarigojn.

La 11-an de aŭgusto 1985 loka ĵurnalo raportis, ke en la lago Kanas oni trovis grandegajn ruĝfiŝojn, kiuj longas 10-15 metrojn, pezas pli ol kvar tunojn kaj havas grandan kapon, unu metron granda.

En 1987 sciencista ekspedi-

cio venis al la lago por studi tiun ĉi misteron. Post du-jara esplorado oni trovis en la lago grupon de ĉirkaŭ 40 grandaj ruĝfiŝoj, tri-kvar metrojn longaj. Poste la ekspedicio anoncis, ke la tiel nomataj monstroj estas simple grand-egaj ruĝfiŝoj.

Sed ne ĉiuj konsentis pri tiu ĉi decido. Iuj kontraŭ-diris, ke ruĝfiŝoj dum la nask-sezono devas iri al aliaj lokoj, tamen ĉiuj riveroj, kiuj estas ligitaj al la lago Kanas, estas tre mallargaj kaj malprofundaj, kun multaj ŝtonoj, tial tiaj grandaj ruĝfiŝoj ne povus iri tra tiaj riveroj.

Aliaj specialistoj diris, ke por la apero de tiel grandaj fiŝoj estas bezonataj multaj manĝaĵoj kaj bonaj kondiĉoj, sed en tiu ĉi kontinenta lago, kiu troviĝas inter montoj, la akvo estas tre malvarma, tial la fiŝoj en ĝi kreskas tre malrapide, do ilia korpo ne povas atingi la dekmetran grandecon.

Zhu Liping, specialisto el instituto pri Qinghai-Tibeta alteben-aĵo ĉe la Ĉina Akademio de Sciencoj, el-diris la opinion, ke la nekonataj objektoj de la lago Kanas estas ne iuj monstroj



aŭ fiŝoj, sed pli verŝajne focenoj aŭ iuj similaj bestoj; ke ili estas tiel grandaj pro tio, ke ili vivas en profunda lago, malofte ĝenataj de homoj.

Ĉu ili povus esti monstroj, similaj al antaŭ-historiaj grandegaj krokodiloj aŭ dinosaŭroj, kiujn oni ne konas ĝis nun? Laŭ la studoj de specialistoj, ĉirkaŭ la lago oni ne trovis restaĵojn de dinosaŭroj; krome, la dinosaŭroj malaperis antaŭ 65 milionoj da jaroj, dum la lago Kanas formiĝis nur antaŭ 200 mil jaroj – do inter ili estas neniu rilatoj. Sed ja ekzistas tre malgranda ebleco, ke iuj bestoj, kiuj apartenas al iu pra-speco, longan tempon

vivas nun en specialaj kondiĉoj de la lago Kanas.

**dinosaŭroj** – grandegaj tim-igaj bestoj, kiuj antaŭe loĝis sur la Tero  
**ekspedicio** – speciale preparita veno de sciencistoj en la regionon, kie oni volas studi ion

**foceno** – mara varm-sanga besto, simila al delfeno aŭ malgranda baleno

**krokodilo** – malvarm-sanga bestego kun grandegaj dentoj

**mistero** – io, kion oni ne konas; mistera – nekonata, nekomprenebla  
**monstro** – (ĉi tie) grandega, timiga aŭ nekonata besto

**motorboato** – negranda ŝip-eto, kiu moviĝas mem-stare, sen la helpo de vento

**ondo** – ondoj aperas sur la akvo, kiam blovas forta vento

**ruĝfiŝo** – (ĉi tie) speco de fiŝo, *Hucho taimen* (vd. la foton)

**spuro** – restaĵo, post-signo de io  
**tuno** – milo da kilogramoj



## Socioniko – la arto kompreni la aliulon

*Paŭlo Mojajev, Ukrainio*

**Ĉu vi iam trafis la situacion, kiam vi ne povas kompreni la konduton de iu homo? Ĉu vi estis atestanto de tio, ke iuj paroj kunvivas pace kaj konkorde, dum la aliaj konstante kverelas? Ĉu vi sentis iam, ke vi konas la ĵus prezentitan homon jam delonge? Ĉu vi iam sentis envion al viaj konatoj, kiuj certe estas pli lertaj pri certaj aktivadoj, ol vi? Ne maltrankviliĝu – multajn similajn demandojn povas respondi socioniko!**

### **Komence estis la informo...**

Socioniko estas sufiĉe juna scienco, studanta la konduton kaj kapablojn de la homoj surbaze de la teorio pri informa metabolo. Ĉu tio sonas tro komplike? Fakte, ĉio ne estas tiel malfacila, kiel tiu difino; ankaŭ ne tute ĝustas nomi la socionikon scienco. Malgraŭ tio ke ĝi havas certajn trajtojn de scienco, ĝi estas grandparte arto – la arto kompreni la aliulon kaj prognozi ties kapablojn, kondutojn, preferojn ktp.

Socioniko (soci-on-iko; pri tio, kio estas socio, vidu sube) naskiĝis pli-malpli “oficiale” fine de la 1970-aj jaroj. La bazon de socioniko kreis litova esploristino Aušra Augustinavičiūtė. Ŝiaj ideoj, fakte, estis plua evoluigo de la ideoj de S. Freud kaj C. G. Jung (la unua malkovris, ke la homa psiko havas komplikan strukturon kaj estas pli granda ol tio, kion la homo konscias; la dua estis fondinto de la teorio pri la psikaj tipoj). Surbaze de la teorioj de Jung kelkaj aŭtoroj (Eysenck, Meyers-Briggs, Keirsej k.a.) kreis diversajn psikologiajn klasifikojn kaj testojn, kiuj iĝis vaste konataj kaj ofte uzataj. Tiuj klasifikoj kapablis pli-malpli bone klarigi la personajn ecojn de la diverstipaj homoj,

sed tute ne povis antaŭdiri la homajn interrilatojn.

La aŭtorino de socioniko iom plide-taligis la klasifikon de Jung kaj aplikis al ĝi kelkajn leĝojn kaj principojn de informadiko (i.a. la teorion de informa metabolo, kreitan de pola psikologo A. Kempinski). Rezulte, socioniko estas kvazaŭ “altnivela” psikologia klasifiko; aldone – kaj plej grave! – ĝi pruvas, ke la homaj interrilatoj estas forte ligitaj al la personaj ecoj de la homoj. Do, klarigante la principojn de interhoma konduto socioniko ebligas antaŭvidi ĝin, kaj eĉ iom korekti.

### **16 – la plej grava nombro**

Socioniko rigardas ĉiun homon kiel funkciantan informan sistemon. Estas ja klare, ke dum ĉiutipaj aktivadoj ni ricevas iun informon kaj elsendas, produktas iun informon. Klaras ankaŭ, ke diversaj homoj ne same perceptas la saman realecon, ne same akceptas la saman informon. Surbaze de tiu observo jam C. G. Jung ekparolis pri tio, ke la homoj povas esti dividitaj je “pensantaj” kaj “emociaj”, je “intuiciaj” kaj “sentantaj”, je “raciaj” kaj “neraciaj” (t.e. “rezonantaj” kaj “perceptantaj”) kaj fine je “ekstravertaj” kaj “introvertaj” (la t.n. kvar Jungaj dihotomioj). La Junga tipologio ebligis formi ok diversajn kombinaĵojn inter tiuj ok eblaj karakterizoj.

La baza socionika klasifiko de la psikaj tipoj estas principe la sama (oni uzas la samajn nociojn, sed iom aliajn terminojn, ekz. “logiko”, “etiko”, “intuicio”, “sensivo”). Tamen, laŭ socionika koncepto, la kvar bazaj Jungaj dihotomioj povas kombiniĝi sendepende unu de la alia, kio venigas nin al la klasifiko, en kiu estas 16 bazaj tipoj de psika strukturo (la t.n.

psiko-tipo). Oni supozas, ke la tuta informo, kiu ĉirkaŭas nin, povas esti dividita je ok bazaj informo-specoj; por diversaj informo-specoj la homa psiko havas apartajn “perceptilojn”. La plej grava afero estas, ke la forteco de diversaj “perceptiloj” estas malsama ĉe diversaj homoj – ĝuste pro tio la homoj diverse reagas al la samaj stimuloj, diverse kondutas en la samaj situacioj. La 16 socionikaj psikotipoj estas la 16 diversaj manieroj aranĝi la ok diversajn informo-perceptilojn en la homa psiko. Neniu psikotipo estas pli bona, ol la aliaj – ĉiuj estas egalrajtaj kaj ĉiu havas kaj fortajn, kaj malfortajn punktojn.

La psika tipo grandparte difinas kaj premias la pens-manieron, bezonojn kaj konduton de la homo. Tial, se oni scias la tipon de la homo, oni povas tre bone kompreni, pri kio li estas plej kapabla, kiujn instigojn li plej bezonas, kiu posteno kaj profesio estos por li plej taŭgaj ktp. Eĉ pli – socioniko konkludas, ke inter certaj psikaj tipoj estiĝas certaj psikaj interrilatoj (sume – denove! – 16). Iuj el ili estas produktivaj, bonaj, pacaj, interaktivaj (la plej bona okazo estas la t.n. “interkompletigaj” rilatoj, kiam ĉiu el la partneroj singarde kompensas la malfortecon de la psik-funkcioj de sia kunulo). Sed en aliaj okazoj inter certaj tipoj neeviteble estiĝas la malbonaj rilatoj – ĝuste en tiu okazo la partneroj neniel povas interkompreniĝi, ne kapablas eviti la problemojn, diskutojn ktp. Kompreneble, diversaj tipoj de psika interagado estas taŭgaj por diversaj situacioj: la interkompletigaj rilatoj estas perfektaj por geedza vivo, la “samtipulaj” rilatoj (kiam ambaŭ partneroj havas la saman psikotipon) estas plej bonaj por instruado, ĉar en tiu okazo la transdono

de novaj scioj okazos plej facile (ja instruisto nature klarigados ĉion ĝuste tiel, kiel estas plej oportune por la psiko de la lernanto), ktp.

## Reintegri la psikon

Se oni akceptas la bazajn ideojn de socioniko, oni neeviteble venas al la konkludo, ke la homa psiko ĝenerale estas neperfekta – ĝi ne kapablas “digesti” la tutan informon, kiun ĝi ricevas. Ĝuste tial ĉiu homo evitas kaj preferas certajn aktivadojn. Ekzemple, ĉiu scias, ke iuj homoj ŝatas aktivan komunikadon, dum la aliaj estas silentemaj kaj solecemaj; iuj homoj ne tro brue elmontras siajn emociojn, preferante logikan rezonadon kaj persvadon, dum la aliaj povas facile estigi koran kontakton kun ajna homo. Sed se la homa psiko estas neperfekta, ĉu eblas iel ripari la situacion?

La socioniko respondas jese. Ĉiu el la 16 tipoj havas la kompletigan tipon; ĝuste inter tiuj “paruloj” aperas la interkompletigaj interrilatoj. La homoj, kiuj estas “kompletigitaj” tiamaniere, havas multajn avantaĝojn kompare al la “nekompletigitaj”. Tiaj homoj estas pli stabilaj kaj “sanaj” mense, ili havas malpli da psikaj problemoj kaj uzas malpli da fortoj por ĉiutaga aktivado – ĉar apud ili troviĝas la partnero, kiu senkonscie kaj ege delikate proponas helpon pri tiuj psik-funkcioj, kiuj estas plej malfortaj. Interkompletigitaj estas la homoj, kiuj tuj komprenas unu la alian, kiuj facile trovas la ĝustan vorton, sen la peto proponas la necesan helpon. La kompletigantoj ebligas al ni senti nin pli fortaj, pli protektitaj,



Aušra Augustinavičiūtė (1921-2005) – la “patrino” de socioniko


pli aktivaj, dank’ al ili ni povas pli detale kaj pli komplete percepti la ĉirkaŭan realon. Ne estas mirinde, ke ĝuste tiaj paroj havas la plej firman kaj trankvilan geedzan vivon, dum la ofteco de divorcoj ĉe ili estas multe malpli granda, ol ĉe la paroj kun aliaj interrilatoj.

La sekva ŝtupo de “psik-reintegrado” estas la t.n. “kvaropoj”, kiuj konsistas el du interkompletigaj paroj. Ĉiu membro de la kvaropo estas eĉ pli forta psike, ol simpla kompletigito. Tamen diversaj kvaropoj (klaras, ke 16 tipoj formas kvar apartajn kvaropojn) havas iom diversajn ideologiojn, iom diversajn taskojn kaj funkciojn en la socio. Tial la plej bona maniero de psik-reintegrado estas kolekti 16 homojn, ĉiu el kiuj havas unu el la 16 tipoj. Tiu grupo (nomata *socio*) estas kvazaŭ plej malgranda funkcia ero de la socio, kaj samtempe miniatura modelo de la tuta socio. Ene de socio estas eblaj ĉiuj 16 intertipaj interrilatoj, interalie la ege grava por la evoluo “socimenda interrilato”. En tiu okazo unu el la partneroj (la “mendato”) ne povas kontentiĝi pri siaj bezonoj, rigardante la “mendanton” (kiu superas la mendaton pri certaj psikaj kvalitoj), kaj tial emas al sinperfektigo, al progreso. La ekzisto de tiaj interrilatoj estas la kaŝita kialo de evoluo de la socio kaj de la tuta socio. Samtempe socio estas formita de kvar kvaropoj (ene de ĉiu kvaropo mankas la plej malbonaj, la t.n. “konfliktaj” interrilatoj), kaj ĉiu kvaropo konsistas el du interkompletigaj paroj. La interkompletigaj rilatoj estas bezonataj por bona psikosomata sano de la homo, la kvaropo plifaciligas al la homo la socian aktivadon, dum socio estas peranto inter la apartaj homoj kaj la tuta socio.

## Helpi la homon

Klaras, ke la ĵus prezentita “sociona” naturo de la homaj interrilatoj estas nur ideala imagaĵo (malgraŭ tio, ke tiu teorio sekvas el la principoj de socioniko, kies multaj aksiomoj estas jam pruvitaj praktike). En la reala vivo la homoj kuniĝas kaj grupiĝas laŭ la principo de hazardismo – jen pro nescio de la socionikaj leĝoj, jen pro la “kontraŭsociona” strukturo de la nuna socio, en kiu ni ne ĉiam povas decidi, kun kiu labori kaj pri kio okupiĝi.

Tamen, eĉ nun socioniko povas multe helpi al ĉiu homo. Ĝi ebligas pli bone kompreni la motivojn kaj bezonojn de la ĉirkaŭuloj, ĝi helpas pli trafe elekti la profesion kaj agokampon por vi kaj por viaj infanoj, pli efike formi labor-grupojn, pli facile solvi diversajn problemojn. Dank’



Ekzemplo de la simboloj, uzataj en socioniko. Sur la bildo estas prezentita la t.n. A-modelo de la psik-strukturo de la tipo “intuicie logika introvertulo” (INTJ, laŭ la klasifiko de Meyers-Briggs). La numeritaj ĉeloj prezentas la 8 psik-funkciojn, la simbolo en la ĉelo – la informan esencon de tiu funkcio (la specon de informo, akceptatan per tiu funkcio). La funkcioj 1, 2, 7 kaj 8 estas fortaj, la aliaj – malfortaj. La unua etaĝo (la ĉeloj 1 kaj 2) formas la blokon Ego (se uzi la terminologion de Freud), la dua etaĝo – la blokon Superego, la tria etaĝo – la blokon Superid, la kvara etaĝo – la blokon Id.

al socioniko ĉiu homo povas pli bone kompreni sin mem, pli facile akcepti sin tia, kia li estas. Multaj homoj suferas pro tio, ke ili estas “ne tiaj, kiel la aliaj” – socioniko helpas forigi la dubojn pri sia “neperfekteco” kaj trovi en si tiujn pozitivajn kvalitojn, kiuj antaŭe estis nerimarkitaj. Socioniko harmoniigas la tutan medion ĉirkaŭ la homo, kiu scias kaj uzas ĝiajn principojn.

Oni tamen ne supertaksu la povojn de socioniko. La socionika paradigmo tute ne forigas la individuajn diferencojn, kaŭzatajn de eduko, personaj konvinkoj, religiaj kaj naciaj apartaĵoj. Tamen la socionika klasifiko ebligas paroli pri la bazaj valoroj, pri la baza kondut-strategio de la homo. Jam tio povas helpi al la homo signife plibonigi sian vivon.

## <Legu>

Por pliaj informoj vizitu multlingvan (ankaŭ Esperantan) paĝaron <<http://www.socioniko.net>>.

# Kiom diversaj ni estas?

Inter socionikistoj (la homoj, kiuj okupiĝas pri socioniko, vd. la paĝojn 10-11) jam antaŭ longe aperis la specifa socionikista humuro. Jen la ekzemplo de unu humuraĵo, kiu, krom ridetigi, ebligas al vi ankaŭ kompreni kaj senti la diferencon inter diversaj psikotipoj. Sendube, ĉiu leganto povos elekti la kondut-strategion, plej proksiman al si, aŭ rekoni en la priskriboj la kondutmanieron de siaj konatoj. Tamen, bonvolu ne rigardi tiujn priskribojn kiel seriozajn – finfine tio estas nur socionikista ŝerco!

Komence rememoru la historian okazaĵon, kiam Aleksandro la Makedona estis petita malligi la faman Gordian nodon, onidire ne malligeblan. Aleksandro dishakis la nodon per unu forta bato – la ago sufiĉe karakteriza por la homoj, kiuj havas la psikotipon, nomatan socionike “logike sensiva ekstravertulo”. Ni provis imagi, kiel agus en la sama situacio la reprezentantoj de ĉiuj aliaj psikotipoj – kaj jen la rezulto.

*Logike intuicia ekstravertulo* komence dirus: “Ha, kiel interese!” Post analizo de la kurbeco de la nodo li proponus novan teorion pri kurbeco de la spaco, kiu anticipus la aliajn similajn teoriojn je multaj jarcentoj. La samtempuloj, kompreneble, komprenus nenion kaj decidus, ke li blasfemas. La plua sorto de la inventinto estas klara.

*Etike sensiva introvertulo* post iom da umado suspirus, rigardus la sunon kaj proponus: “Amikoj, jam estas malfrue (aŭ – ankoraŭ estas tro frue), eble ni vespermanĝu (aŭ – matenmanĝu), kaj poste kun freŝaj fortoj ni aliros la problemon”.

*Sensive etika ekstravertulo* komence rakontus kelkajn amuzajn historiojn pri siaj konatoj, kiuj iam devis ligi kaj malligi la nodojn (ĉiam plej sukcese). Ŝajniginte sin granda specialisto, li tuj transdonus la taskon al sia anstataŭanto kaj ekirus al la plej proksima bazaro kontroli, kion oni vendas kaj kion novan rakontas.

*Intuicie logika introvertulo* petus stiletton kaj vaksan tabulon kaj komencus elabori teorion pri malligo de la nodo. Liaj postaj agoj dependus de la rezultoj de la teorio: se ĝi estus proponinta iun solvon, li persiste malligadus la nodon, kontrolante siajn grafikaĵojn; se ne – li tuj rifuzus okupiĝi pri la afero.

*Intuicie etika ekstravertulo* alvokus ĉiujn ne pensi nur pri la nodo, sed aliri la problemon pli vaste, konsiderante ĝiajn historiajn kaj filozofiajn aspektojn, kaj ankaŭ konsideri ĉiujn postsekvojn de la malligo. Tuj post lia elokventa parolado la ĉirkaŭuloj decidus lasi la nodon kaj disiri, kaj li mem ofendiĝus pro tio, ke oni miskomprenis lin.

*Etike intuicia introvertulo* komence forkurus terurita. Se oni kaptus lin, li verkus poemegon pri la nodo, kun la komenca linio “Mistera interplekto de la sortoj...”

*Sensive logika introvertulo* komence provus malligi la nodon, sed en okazo de malsukceso li tuj ekirus al sia superulo por ricevi instrukciojn. Se li ne povus trovi la superulon (aŭ, se la instrukcioj mankus), li skribus la raporton pri tio, ke la nodo ne estas malligebla pro tio, ke...

*Logike sensiva ekstravertulo* agus senhezite kaj senprokraste – tuj distranĉus la nodon. Li ja havas pli gravajn problemojn, ol malligi la nodaĉojn. La fakto, ke la nodo devis esti nome malligita ne estus grava, ĉar por ĉiu fremda regulo li havas sian propran.

*Intuicie logika ekstravertulo* tuj malligus la nodon kaj tuj farus du novajn, eĉ pli komplikajn, ol la antaŭa. Post tio li rapide organizus konkurojn pri ligado kaj malligado de nodoj, samtempe vendante la nodojn-talismanojn.

*Sensive etika introvertulo* batalus kontraŭ la nodo ĝis la morto sen ajna rezulto. Antaŭ la morto li testamentus la solvodon de tiu problemo al siaj posteuloj.

*Logike intuicia introvertulo* post

skrupula palpado de la nodo kaj kelkaj provoj malligi ĝin decidus, ke tiu nodo estas tute nekomprenebla. Decidinte, ke unu el la ŝnuroj en la nodo mistike iĝas la dua, li ek sidus por meditado.

*Etike sensiva ekstravertulo* tuj ekindignus: “Kiu fiulo elpensis tiun stultaĵon? Montru lin al mi tuj, mi volas scii, kial li decidis okupiĝi pri tio! Ĉu li mokas min?” Kaj poste li okupiĝus jam ne pri la nodo, sed pri ties kompatinda kreinto. Se la kreinto ne estus trovita, la malliganto preferus tranĉi la nodon, samtempe riproĉante ĉiujn ĉirkaŭulojn, eĉ siajn aliancinojn.

*Etike intuicia ekstravertulo* estus ravita: “Ho, kia belaĵo, kia interesaĵo!” Poste li ekdancus ĉe la nodo, tirante diversajn ŝnurojn unu post la alia. Ĉe la tria tiro li hazarde trafus la necesan ŝnuron, kaj la nodo disfalus per si mem. La sukcesinto ekfierus (“Jen kia mi estas!”) kaj dignoplene forirus.

*Logike sensiva introvertulo* prenis la nodon kaj forportus ĝin hejmen. Hejme li pristudus la nodon malrapide kaj fundamente, kaj malligus ĝin nur post kelkaj jaroj. Se tiutempe ĉiuj jam estus forgesintaj pri la nodo, li estus ege ĝoja – ja ne necesas redoni la ŝnuron, kiun eblas uzi en la hejma mastrumado.

*Sensive logika ekstravertulo* unue demandus, kiam devas esti malligita la nodo. Ĝuste en la menciita tempo la nodo estus malligita.

*Intuicie etika introvertulo*, puŝata de la sankta devo, tuj komencus la malligadon. Tamen pro la timo malsukcesi kaj pro la granda pezo de la respondecado li preskaŭ tuj svenus. Post rekonsciiĝo li fuĝus for pro honto kaj decidus ĉiutage ligi kaj malligi malgrandan nodeton por alkitimiĝi al tio kaj eviti la eventualajn malsukcesojn.

La originalon aŭtoris L. A. Koĉubejeva kaj M. L. Stojalova; libera traduko de P. Mojajev.




# Projekto RoMEo – finfine la komenco!



Daniele Binaghi, Italio

Antaŭ kelkaj semajnoj JEFO kaj IEJ (Esperantistaj Junularoj de Francio kaj Italio) decidis kune subteni la projekton “RoMEo” kaj eldoni la bildstrian libreton pri Rat-Man en Esperanta traduko. La libreto enhavas plurajn aventurojn de la musa superheroo kaj la informojn pri lia historio kaj lia aŭtoro; krome, estos informoj pri la agado de JEFO kaj IEJ. Pro tio, ke oni celas ankaŭ la komiks-emulojn el la du nacioj, oni donos informojn pri Esperanto ankaŭ nacilingve. Do, ĝi estos bonega okazo riĉigi sian propran komiks-kolekton kaj diskonigi E-ton. La libro uzeblas ankaŭ kiel studilo por gelernantoj aŭ kiel donaco por komiksama amiko.

La proksimuma kosto de la ĉefverko estos 5-6 EUR. Eblos aĉeti perpoŝte, rekte ĉe la du asocioj kaj, verŝajne, per la libroservoj.



La ĝisdatigitajn informojn vi ĉiam trovos ĉe la retpaĝo <<http://www.pecorelettriche.it/esperanto/RoMEo>>; tie baldaŭ aperos ankaŭ la klarigoj pri la antaŭmendo de la komikso.

© Leo Ortolani, 2007  
Estas tradukita en Esperanton de Daniele Binaghi



# Pri praktika mistikismo – en Esperanto!



H. Spencer Lewis

**Havi prosperon en la vivo.** H. Spencer Lewis. Tradukis S. Kärrefors. AMORC. 1998. 75 paĝoj.

Joel Amis, Usono

La vortoj “mistikismo” kaj “praktika” tradicie ne asociĝas en la mensoj de multaj homoj. Ofte en la ĉiutaga lingvo, kiam iu nomas ion “mistika”, oni emas pensi pri io magia, neracia, religieca aŭ eĉ superstiĉa. Tamen tiu vulgara uzo de la vorto “mistika”, same kiel la misaj

uzoj/komprenoj de la vortoj kiel *mistero*, *profana*, *okulta* k.s., donas malĝustan impreson pri la vera signifo de mistikismo. En sia libro *Havi prosperon en la vivo* D-ro H. Spencer Lewis helpas al ni malkovri la praktikecon de mistikismo.

En la frua parto de la 20-a jarcento D-ro Harvey Spencer Lewis ricevis komision de la Rozkruca Ordeno en Eŭropo revigligi la Ordenon en Norda Ameriko. En 1915 li establis la Rozkrucon Ordenon en Usono sub la oficiala nomo Antikva kaj Mistika Ordeno de la Rozkruco (AMORC). Kvankam ĉiam dum la jarcentoj de ĝia ekzisto la instruoj ĉiam emfazis praktikan aplikon de mistikaj principoj, D-ro Lewis utiligis modernajn rimedojn por diskonigi la rozkrucajn principojn al pli vasta publiko. Li tion faris per du ĉefaj manieroj: unue, li havebligis la rozkrucajn instruojn en skriba formo tiel ke homoj eĉ en izolitaj lokoj povu membri en AMORC kaj

studi la rozkrucajn lecionojn; kaj due, per siaj multaj publikaj prelegoj kaj libroj haveblaj al la ĝenerala publiko.

Siatempe la plej populara libro de D-ro Lewis estis *Havi prosperon en la vivo* (originala angla titolo: *Rosicrucian Principles for Home and Business*). Ĝi furoris kiam ĝi unue aperis en la malfruaj 1920-aj jaroj – kaj nun ĉi tiu klasikaĵo haveblas ankaŭ en Esperanto!

Sed, vi demandas vin, kion signifas praktika mistikismo? Tio simple signifas la aplikon de mensaj, spiritaj, psikaj kaj psikologiaj principoj al problemoj de la ĉiutaga vivo, ĉu en la hejmo, en interpersonaj rilatoj, en la laborejo ktp. En *Havi prosperon en la vivo* D-ro diskutas la temojn kiel, ekzemple, la krea povon de pensoj, bildigon de deziroj, kaŭzon kaj efikon, karmon k.a. kaj kiel apliki tiujn principojn por akiri novan postenon aŭ promocion, por pozitive influu homojn en la labora kaj persona vivo, por

havi pli trankvilan kaj sanan vivon, kaj por efektiviĝi siajn planojn. Kiel en siaj aliaj verkoj, D-ro Lewis alparolas la leganton en tre klara, konversacieca stilo, kun multaj konkretaj ekzemploj por ilustri la principojn.

Eventuala kritiko pri la libro estas ke ĝi prezentas nur la plej elementajn rozkrucajn instruojn foje en iom simplisma maniero. Nu, respondo al tiu kritiko estas ke D-ro Lewis ja ne verkis la libron por spertaj esoteristoj kaj mistikuloj, sed por ordinaraj homoj – tiurilate ĝi ja sukcesas. *Havi prosperon en la vivo* estas bona, facile komprenebla enkonduko al iuj el la elementaj principoj de Rozkruco kaj samtempe estas utila helpilo por tiuj, kiuj volas plibonigi iujn aspektojn de sia vivo.

## <Legu>

Pliaj informoj pri Rozkruco troveblas ĉe <[www.amorc.org](http://www.amorc.org)>

## La ŝanĝiĝoj kaj ni

Onyelukachukwu Etuazim, Niĝerio/Usono

“Se vi havas nur **martelon**, ĉio ŝajnas **najlo**”  
Bernard Baruch

Estas ege malofte, kiam du homoj komprenas ion tute same. Sed malgraŭ tio ĉi, pro kulturaj aŭ aĝaj similecoj ne estas malkutime trovi similecojn en la pensado, ekzemple, de sepdek-jaruloj el la sama socio. Do, ni povas plen-raĵte diri, ke ĉiam ekzistas certaj similecoj en la juĝo pro similaj kulturaj ĉirkaŭaĵoj.

Se estus eble porti la homojn de la pasinteco en la nunan tempon kaj demandi ilian opinion pri la hodiaŭaj ĉiu-tagaj, ne estus **surprizo**, ke la plejparto de la loĝantoj de la frua deknaŭa jarcento daŭre dirus, ke flugado de Novjorko al Londono en la

sama tago, en la plej bona kazo, estas scienc-**fikcio**. Iuj sciencistoj de la sama tempo vicus por **veti**, ke sen-halta trans-atlantika flugado estos tute ne ebla. Se ni daŭrigus la liston kaj parolus al ili pri telefono, **faksilo**, kalkul-ilo kaj aliaj antaŭ-cifer-ecaj “mirakloj”, la respondo al tio estus tiom **indigna**, ke estas pli bone eĉ ne imagi tion.

Strebi kompreni la miraklojn de la cifereca tempo povus esti tro kapo-turna por ni, ja multaj homoj vivas samtempe en du (aŭ pli) historiaj periodoj. Ekzemple, multaj el tiuj, kiuj naskiĝis komence de la 20-a jarcento, vivas ankaŭ en la 21-a jarcento, kaj nia devo estas kompreni ilian internan batalon kontraŭ tiom da ŝanĝoj en la vivo, kiujn ili spertas.

Ni prenu kiel ekzemplon la sciencon de **DNA** kaj ĝian

uzadon por polica esplorado, aparte kiam temas pri mortigoj kaj perfortoj. Tiu scienco tiom rapide evoluis de 1992 ĝis nun, ke dek kvin jaroj aspektas kiel duon-jarcento. Do, ne estos surprize, ke por la homoj, kiuj naskiĝis en malfruaj 1980-aj jaroj, la pli frua tempo aspektos kiel mez-epoko pro la kvanto de erare mal-liber-ig-itaj homoj. Bonŝance, multaj el ili finfine povis liberiĝi ĝuste dank'al la evoluo de la DNA-scienco.

Do, la nuna demando estas, kiel ni ĉiuj – kaj pliaĝuloj, kaj gejunuloj – rigardu la nunan tempon? Antaŭ la unuaj, tut-certe, staras pli alta monto por supren-iri. Kvankam la ŝanĝo en la vivo kaj la medio estas ĉiama afero, la batalo kontraŭ la ŝanĝiĝoj estas la dua naturo por la plejparto de ni. Estas ankaŭ ver-ŝajne, ke multaj gejunuloj demandos sin, kiel oni povis fari ion tiom facilan

tiom fuŝe en la pasinteco?

Fine de la tago, por ne havi “nur martelon”, ni devas havi **flekseblan** rilaton al la multeco de novaj **pruvoj**, kiuj neeviteble ŝanĝos la malnovajn verojn. Ja post ĉio, hieraŭ oni pri-ridis ankaŭ niajn hodiaŭajn verojn... Ĉiam, kiam oni devas elekti inter pruvo kaj logiko, mi elektas la pruvon.

**DNA** – la biologia mekanismo, per kiu ĉiu vivulo trans-donas iujn siajn ecojn al siaj posteuloj  
**faksilo** – ilo por sendi kaj ricevi tekstojn aŭ bildojn per telefona sistemo

**fikcio** – el-pens-aĵo  
**fleksebla** – (ĉi tie) ŝanĝebla  
**indigna** – oni estas indigna, kiam oni koleras al iu pro la ago, kiun oni komprenas kiel mal-estim-indan, maljustan kaj tiel plu  
**martelo** – ilo por en-bati najlojn  
**najlo** – long(et)a peco de metalo, kiun oni en-batas en objekton por fiksado aŭ ligado  
**pruvo** – per pruvoj oni povas montri verecon de io  
**surprizo** – io ne antaŭ-vid-ita  
**veti** – inter-konsenti pri mon-sumo aŭ iu valorajo, kiun la persono, kiu montriĝos malprava, devos pagi al la alia

Trad. de la angla kaj faciligis Jenja Amis





La redakcio de *KONTAKTO* kore gratulas la bienon-lernejon Bona Espero okaze de la 50-jara jubileo! Gratulojn al ĉiuj volontuloj kaj subtenantojn de Bona Espero, aparte al Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia! Vivu kaj prosperu Bona Espero!

Anonce

Korespondi deziras

Saluton! Mi estas 15-jara esperantistino; interesoj: naĝado, fotado, literaturo, internacia kuirarto, interkultura komunikado. Mi dezirus trovi geamikojn en la tuta mondo. Mi posedas ankaŭ la anglan lingvon. Bv. skribi al: Eva Ionesova, ul. Sernovodskaja 140, RU-443044 Samara, Rusio.

JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

– aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriroj; – havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj; – rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

*modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), enhavo tre varia: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.*

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <[www.junaamiko.inf.hu](http://www.junaamiko.inf.hu)> aŭ en <[www.lernu.net](http://www.lernu.net)>!

Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: *Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio*

Scivolemejo

Aneta Ubik,  
Germanio/Argentino

Iujn aferojn ni devas studi. Oni diras al ni: “Lernu pri tiu temo!”. Tio estas lernejo. Sed multajn temojn ni decidas studi pro nia propra deziro. Ni sentas: “Tio estas stud-enda!”. Tio estas sci-vol-em-ejo.

La lern-end-aĵoj, kiuj aperas pro ies ekstera volo, ne ĉiam estas la samaj, kiel nia ena sci-vol-emo. Ni do devas kresk-igi **disciplinon** kaj **persistemon**. Iusence... esti **traktoro**, ĉiama, forta kaj saĝa **traktoro**. Jen la maniero ricevi monon en nia mondo.

Nu! Ni trovu la eblon **konscie** mov-iĝi en la propra “scivolemejo”. Tio faras la vivon pli interesa –

tuj aperas **fulm**-etoj en la **okuloj**: “Tio vere interesas min!” La temoj povas ŝanĝi dum la vivo, laŭ nia propra kresko kaj ŝanĝ-iĝo.

Kaj Esperanto? Ankaŭ ĝia signifo en la propra vivo ŝanĝ-iĝas kaj aliform-iĝas. Ĝi daŭre **fulm**-ig-etas la **okulojn**.

**disciplino** – emo havi bonan ordon en ĉio, fari ĉion korekte kaj ĝustatempe

**fulmo** – brila linio en la ĉielo, kiu sekvas tuj post la fortaj sonoj

**konscie** – (ĉi tie) kun bona kompreno pri la situacio

**okulo** – per la okuloj la homo vidas

**persistemo** – la emo plu labori malgraŭ malhelpoj kaj malfaciloj

**traktoro** – granda kaj forta maŝino por, inter alie, movi aliajn maŝinojn



Abonkotizo por *KONTAKTO* por la jaro 2007

|                  |      |                        |     |                        |
|------------------|------|------------------------|-----|------------------------|
| Lando/valuto     | Kto  | Kanado/dolaro          | 31  | Italio; Kipro kaj      |
| Aŭstralio/dolaro | 34   | Malto/eŭro             | 15  | Slovenio laŭ Malto;    |
| Aŭstrio/eŭro     | 22   | Nederlando/eŭro        | 22  | Liĥtenŝtejno laŭ       |
| Belgio/eŭro      | 22   | Norvegio/krono         | 170 | Svislando; Bulgario,   |
| Brazilo/eŭro     | 10   | Nov-Zelando/dolaro     | 40  | Latvio, Litovio kaj    |
| Britio/pundo     | 15   | Pollando/zloto         | 46  | Rumanio laŭ Estonio.   |
| Ĉeĥio/krono      | 460  | Portugaliao/eŭro       | 22  | TARIFO A: Honkongo,    |
| Danio/krono      | 160  | Rusio/eŭro             | 10  | Korea Respubliko,      |
| Estonio/eŭro     | 12   | Slovakio/krono         | 550 | Singapuro, Sud-Afriko, |
| Finnlando/eŭro   | 22   | Svedio/krono           | 200 | Tajvano.               |
| Francio/eŭro     | 22   | Svislando/franko       | 32  | TARIFO B: Ĉiuj ceteraj |
| Germanio/eŭro    | 22   | Usono/dolaro           | 24  | landoj ne jam menci-   |
| Greklando/eŭro   | 22   | TARIFO A/eŭro          | 14  | itaj.                  |
| Hispanio/eŭro    | 22   | TARIFO B/eŭro          | 10  |                        |
| Hungario/forinto | 4100 | ALIAJ LANDOJ:          |     |                        |
| Irlando/eŭro     | 22   | Luksemburgio laŭ       |     |                        |
| Islando/eŭro     | 20   | Belgio; San-Marino laŭ |     |                        |
| Israelo/eŭro     | 16   |                        |     |                        |
| Italio/eŭro      | 22   |                        |     |                        |
| Japanio/eno      | 3000 |                        |     |                        |

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!  
fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- revuon *KONTAKTO*
- bultenon TEJO Tutmonde (oficiala organo de TEJO)
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

# Kabulo



*Samad Qarluq, Afganio*

Kabulo, la ĉef-urbo de Afganio, troviĝas en la centro de la lando. La urbo havas 15 partojn. Ĉirkaŭ 3,5-4,5 **milionoj** da homoj loĝas en Kabulo. Kabulo estas ĉirkaŭita de montoj. La vetero en Kabulo estas varmema kaj sekega en somero kaj tre mal-varma en vintro. Vintre ĉi tie multe neĝas kaj blovas fortaj ventoj. En printempo multe pluvas, kaj multaj stratoj de la urbo iĝas malpuraj kaj **kotaj**. Somere la aero estas tre varma kaj **polva**.

En Kabulo estas tri universitatoj. Malgraŭ tio, ke ĝi estas granda kaj moderna urbo, la pli granda parto de la loĝ-ant-aro (80%) suferas pro mal-riĉ-eco kaj foje ne havas eĉ sufiĉe da pano por manĝi kaj por doni al siaj infanoj.

En la urbo estas multe da vidindaj lokoj. 25 kilometrojn okcidente de Kabulo troviĝas la **valo** Pagman, kiu somere kaj printempe estas tre bela kaj

verda loko. Norde de Kabulo estas belaj, malnovaj kaj famaj lokoj Istalifo, Pagramo, Salango kaj Panŝiro, kiujn oni povas atingi dum tri-hora vojaĝo per aŭto. Somere multaj loĝantoj de Kabulo pasigas sian liberan tempon en tiuj lokoj, kie estas multe



da pura akvo kaj la vetero ĉiam estas bela.

Dum la jaroj 1992-1994 en Kabulo okazis akraj bataloj, kiuj preskaŭ tute **detruis** la urbon. La pontoj, stratoj, domoj, lernejoj kaj tiel plu estis **detruitaj**, kaj la loĝ-ant-aro estis dev-



multe helpas pri la rekonstruado de la lando, multaj problemoj ankoraŭ ekzistas sur la vojo de la paco.

Fotoj: Fukuda Toshihiro, Japanio. Supraj fotoj: Kabulo; malsupra foto: Panŝiro.

**detru** – malkonstrui, preskaŭ neniigi

**civilulo** – ne-soldato; persono, kiu ne parto-prenas militon

**koto** – malpura miksaĵo de tero kaj akvo

**miliono** – milo da miloj

**polvo** – malgrandaj eroj de tero kaj mal-pur-aĵoj, kiuj flugas en aero

**valo** – granda natura malaltejo apud rivero

**vundi** – kaŭzi malsanon al ies korpo per intenca malamika ago (ekz. bato)

ig-ita for-lasi la urbon pro la sangaj bataloj. Ĉirkaŭ 60 mil sen-kulpaj **civiluloj** estis mort-ig-it-aj aŭ **vunditaj** dum la militaj tempoj.

Kvankam la internacia komun-umo subtenas la Afganian reg-ist-aron kaj